

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



N-ro 640 (3)

Marto 1959



Lamenhof-Jaro

**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. HODLER

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

Geredaktoroj: s-ino Kirsten Zacho kaj s-ro H. V. Rasmussen, cand. oecon.

Cion por la redakcio oni sendu al la Redakcia adreso: S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1959): 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto: Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜA BILDO PREZENTAS

okjaran polan knabineton Esperantyna Izabela Misiwicz. Izabela estas denaska esperantistino; ŝi skribas al ni: Goje mi eksciis, kio okazas en la jaro 1959 en Varsovio, kaj en la nomo de polaj infanoj mi tutkore invitas la infanojn de la tuta mondo veni al Pollando, al la patrujo de Esperanto.

Enhavo

Kultura agado de la Societoj	41
Korekta lingvouzo en nia revuo	41
"Esperantologio reaperos"	42
L. L. Zamenhof - pionira poeto	43
Sveda Somera Semajno	46
Ligue Française "Pro UNESCO"	48
Tradukado nacilingven	49
Zamenhof-monumento	50
Klubo Esperantista de Malmö	51
Esperanto en televido	55
Statistiko pri la Membraro de UEA	56
S-ino Haudebine informas	56
Nekrologo pri R. F. Vaughan	57

Rubrikoj:

Okaze de la Zamenhof-Jaro	42
CED	47
La internaciaj konkursoj	48
La Juna Vivo	54
44-a Universala Kongreso	55
Radio	56
Esperantista Vivo	56
Oficiala Informilo	57

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

Kultura agado de la societoj

Korekta lingvouzo en nia revuo

Grava temo de la pasintjara Universala Kongreso estis: "La lokaj societoj-kerno de nia movado". Kaj efektive, ĝis kiam Esperanto estos larĝe utiligata kaj akceptata internacie kaj ĝi estos instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo, la tasko de la societoj estos neanstataŭigebla. De la komenciĝo de la movado la societoj konsistigis la movadon mem, ĉu per sia loka agado, ĉu kiel eroj de la internacia agado.

Sed por atingi superajn ŝtupojn ĝis la lasta estas necese, ke la societa aktiveco fariĝu pli kaj pli kultura. La procezo de formiĝo kaj disvolviĝo de la naciaj lingvoj interesigis al la kulturo kaj ĝia kreado dekomence mallarĝajn tavolojn de la koncerna socio; La Internacia Lingvo, transsaltante la unuan stadion propran de la naciaj lingvoj, interesigis proporcie tuj tavolojn pli kulturitajn.

Se ni konsideras ankaŭ, ke nia movado estas interalie esence kultura fenomeno, ni komprenas la gravan rolon, kiun sur la kultura kampo devonas ludi la lokaj societoj.

Kiam ni fieras pri nia traduka kaj originala literaturo ni devas ne preteratenti, ke ĝi ebligis ĝuste pro la fakto de reciproka interfludo inter la estiĝanta lingvoportanto (la esperantista popolo) kaj la literaturo mem; kaj la esperantistan popolon konsistigas ne nur la unuopaj esperantistoj sed ĉefe la societoj, per kiuj la movado vivas, disvolviĝas kaj progresas. En la lastaj jardekoj la movado fariĝis pli kaj pli konscia pri la taskoj, kiuj estas antaŭ ĝi, kaj kiujn ĝi devas solvi en la ĝenerala intereso de la homaro. Pro tio la societoj devas fariĝi ĉiam pli kulturaj fajrujoj por solvi la taskojn de la movado, kaj esti adekvate pretaj al komuna kunlaborado postulata en la diversaj cirkonstancoj de la superaj instancoj de la movado.

En la internacia kampo estas eble entrepreni novajn utilajn aktivecojn, nur se la kulturenivelo de la societoj estas sufiĉe alta. Plejbone, la konstato de ekzisto de bonaj societoj sugestas novajn vojojn alireblajn en la diversaj kampoj de la homa aktiveco, kiuj fariĝas ĉiam pli nombraj kaj specialigitaj.

Niaj societoj estas, kaj devas esti, fajrujoj de nova vere internacia kulturo, kaj ili devas esti konsciaj pri tiu ĉi privilegio de la Esperanto-movado, kiu estas finfine la senco mem de la spirito de la Lingvo Internacia: Esperanto postvivis du detruajn mondmilitojn ĝuste pro sia internacie kultura enhavo, kiu estas eble la plej grava merito de la Zamenhofa penso. Sed la societoj devas adapti al la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj la ilojn por esprimi sian kulturpovon. En la lastaj jaroj, diversaj kulturaj aktivecoj estis entreprenataj aŭ intensigataj; ni citu kelkajn: filmservo, magnetofona servo, kultura informado pere de CED, Somera Universitato, oratoraj konkursoj por gejunuloj, literaturaj revuoj, gravaj eldonoj de literaturaj verkoj k.t.p.

Unuflanke se tiuj aktivecoj estis eblaj dependis de certa matureco de la societoj, aliflanke ili helpis al pli vigla kultura agado en la societoj. Sed ne ĉiuj societoj agis samintense kaj daŭre: ekzemple filmservo kaj magnetofona servo ne estis ĝenerale multe priatentataj, dum ili reprezentas gravan eblecon kulturigan en internacia senco. La disvastigado de la publikigitaj prelegoj de la Somera Universitato ne estis sufiĉe zorgata; komuna legado kaj diskutado de nia originala literaturo ne estis sufiĉe atentata kaj tiel oni ne helpas konvene la eldonejajn klopodojn. La societoj devas instigi la junulojn partopreni oratorajn konkursojn: la junuloj devas heredi la trezoron de la internacia kulturo, kiun la Esperanto-movado kreis, por ke ili pliriĉigu ĝin. La societoj devas pretigi kiel eble plejnombro kaj altkvalite homojn laŭ internacia spirito taŭgajn por la taskoj, kiuj atendas la esperantistaron ĉiutage, kiam ni atingas novajn agnoskojn, kiam finfine ni devas

★

Por la redakcio de la revuo "Esperanto", la oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, estas komprenebla devo klopodi, ke la lingvaĵo en ĝiaj kolumnoj estu modela. Devus esti tiel, ke la esperantistoj povus prave diri: "Tiu esprimo estas sendube korekta, ĉar ĝi estas uzita en "Esperanto". La -us-formoj indikas, ke la redakcio plene konscias, ke tiu celo ne estas atingita - kaj eble ne estas atingebla - malgraŭ konsciencia kontrolado.

Plej facile kaj banale estas atentigi pri la prezeraroj — do ne pli da vortoj pri tiuj. En la sama spiro oni povas menciĝi la erarojn kaŭzitajn de urĝeco. La redaktado okazas dum libertempaj horoj ofte tro malmultaj por tiel zorga kontrolado de manuskriptoj kaj presprovaĵoj, kiel postulas la skrupulemo. Ofte urĝaj manuskriptoj alvenas post la limdato, kaj kelkfoje mendita artikolo tute ne alvenas, kun la eventuala rezulto, ke la redakcio — kiel ĝuste en ĉi tiu kazo — lastmomente devas mem rapidege pretigi tekston. Ĉio tio konsistigas la teknikajn malhelpojn al certigo de senerara lingvaĵo.

Povas okazi, ke oni devas presigi esprimojn, kiuj estas nedubeble mal-korektaj. Se, ekzemple, en premiita literatura konkursaĵo troviĝas la vorto "nemortebla", nepre kontraŭfundamenta, la redakcio havas neniun rajton korekti ĝin.

Dum vortaraj kaj gramatikaj eraroj — kun rezervo de la supre menciitaj teknikaj obstakloj — estas relative facile konstateblaj (povas esti diskutindaj esprimoj, ekzemple pri "-ata" aŭ "-ita"), oni renkontas pli malfacilajn problemojn rilate al la stilo. Estas vere, ke dum la 72-jara evoluo de Esperanto ĝia stilo fiksiĝis. Sed la evoluo ja ne ĉesis, kaj oni, ankaŭ la redakcio de "Esperanto", ne rajtas klopodi bremsi ĝin.

Se, do, la legantoj trovas sur la

montri la taŭgecon de la lingvo en ĉiuj kampoj de la homa agado. Oni diras, ke genio estas longa pacienco: nia kultura movado estas longa konstanta, unuopula kaj samtempe kolektiva pacienco. Dum la Zamenhof-Jaro la societoj intensigu sian kulturalan agadon kunlaborante kun la koncernaj servoj de UEA kaj instigante al novaj pluraj kulturaj aktivecoj per taŭga propono de taŭgaj kunlaborantoj. Estas saĝa celkonscia maniero por festi la Zamenhof-Jaron.

G. A.

paĝoj de la revuo esprimojn, kiuj, kvankam gramatike korektaj, ne konformas al la ordinara stilo, oni komprenu, ke ilin la redakcio allasis ĝuste laŭ tiu vidpunkto.

H. V. R.

Okaze de la Zamenhof-jaro

Speciala Eldono de la Baza Dokumentaro

Komence de januaro aperis en formo de broŝuro la kompleta komenca dokumentaro pri la Zamenhof-Jaro. Ĝi enhavas la nomojn de la personoj, kiuj formas la Internacian Patronan Komitaton, la Deklaracion, la Bazan Programon, la Alvokon, la artikolon de Prof. Privat kaj eltiraĵojn el du artikoloj de Prof. Lapenna. Ĝin ricevis la membroj de la IOK, la landaj asocioj, komitatanoj de UEA, landaj informaj fakoj kaj redakcioj de la Esperanto-gazetoj. Laŭ la jusa decido de la Estraro de UEA, ĉiu individua membro de UEA en 1959 ricevos la broŝuron kiel memoraĵon senpage.

La partoj de la baza dokumentaro, destinitaj al la ekstera mondo, estas nun presataj en la angla kaj franca lingvoj. Tiu angla kaj franca eldono, kune kun la Esperantlingva, estos sendita de la IOK rekte al ĉiuj interŝtataj kaj privataj internaciaj organizaĵoj, al ĉiuj regulaj ricevantoj de la CED-dokumentoj kaj al ĉiuj naciaj UNESKO-komisionoj. La landaj asocioj, la membroj de la IOK kaj la kunlaborantoj en regionoj sen landaj asocioj estas petitaj traduki la koncernan dokumentaron, publikigi ĝin en siaj respektivaj naciaj lingvoj kaj sendi al la landaj sciencaj, literaturaj, klerigaj, kulturaj, komercaj kaj aliaj institucioj; al la direktoj de televido kaj radio; al la redakcioj de gazetoj kaj revuoj; al profesoroj kaj instruistoj kaj al kiom eble plej multaj aliaj kulturaj agantoj.

"Esperanto" 20-paĝa

La Estraro de UEA ĵus decidis, ke, honore al la Zamenhof-Jaro, la revuo "Esperanto" aperos dum la tuta jaro 1959 kiel 20-paĝa plus 4 paĝoj de la kovrilo. La pliaj 4 paĝoj estos utiligataj ĉefe por artikoloj pri D-ro Zamenhof kaj por informoj pri la Zamenhof-Jaro. Ĉiuj membroj de UEA estas varme petataj instigi en la lokaj societoj kaj grupoj al aliĝo en 1959 kiel M.A.

Formiĝo de Landaj Komitatoj

El diversaj landoj venis informoj pri formiĝo de Landaj Komitatoj por organizi la aranĝojn sur landa kaj loka nivelo en la ĝeneralaj kadroj de la Baza Programo. La unua informo venis el Kopenhago, kie la unua kunsido okazis la 24-an de januaro. La kunsido esploris ĉiujn eblecojn en Danlando kaj faris decidojn pri la agado laŭ la sugestoj de la IOK. Gratulon al la danaj esperantistoj! Estus utile, ke en ĉiuj landoj kaj en ĉiu loko, kie troviĝas esperantistoj, tuj formiĝu landaj kaj lokaj komitatoj por tiu celo.

Memorlibro

Laŭ ĉio ŝajnas, ke estos eble publikigi fine de 1959 aŭ komence de 1960 memorlibron omaĝe al D-ro L. L. Zamenhof. Laŭ la unua projekto la libro enhavos artikolojn kaj studojn de elstaraj esperantistoj de diversaj landoj, eldirojn de la membroj de la Internacia Patrona Komitato

pri Zamenhof kaj lia verko, liston de ĉiuj pli gravaj aranĝoj okaze de la Zamenhof-Jaro kaj kompletan nomaron de personoj, kiuj donacis al la Fondaĵo Zamenhof.

"Esperantologio" reaperos!

La dua volumo de tiu ĉi internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto estas nun sub preparo. Dum la paŭzo en ĝia aperado la intereso neniam malkreskis, sed ĉiam insiste restis. Rezulte de tiu dezirado pri reapero de la revuo, U.E.A. larĝanime asignis pruntan, kiu garantias la eldonadon de la dua volumo. Ĝia unua kajero aperos kiel eble plej baldaŭ en tiu ĉi jaro.

Por novaj esperantistoj kaj por neabonintoj jen resume informoj pri la revuo: Ĝi ĉefparte aperigas traktaĵojn bazitajn sur originalaj esploroj en la kampo de Esperanta lingvistiko, t.e. temoj de leksikologio, etimologio, sintakso, stilistiko, kompara lingvistiko, lernopsikologio, fonetiko kaj bibliografio. Krom referatoj kaj recenzoj pri esperantologiaj libroj, ĝi enhavas notojn, ekz. pri universitataj katedroj de Esperanto k.s. La revuo, kiun redakte prizorgas redakta komitato el eminentaj esperantologoj-lingvistoj, aperas per kajeroj 48-80-paĝaj formantaj volumojn 250-300-paĝajn provizitajn per indekso de temoj kaj aŭtoroj. La kajeroj estas eldonataj laŭ la cirkonstancoj, unu volumo kovrante ĉ. tri jarojn verŝajne.

La internacia baza prezo, kiu je la ekapero antaŭ dek jaroj estis fiksita je 5 us. dol., nun pro la deposta inflacia evoluo devas esti plialtigata (vere tre modeste) ĝis 6 us. dol. La prezo cetere varias iom sub konsidero de la aĉetpovo en diversaj landoj kaj estas, ekz., en Britujo 35 ang. ŝil., Danlando 35 d.kr., Germanujo okcidenta 22 g.m.k. Nederlando 20 guld., kaj laŭ Steloj de UL 70.—

Ĉiuj abonintoj ricevas rektan informon tiomgrade kiom niaj adreslistoj estas ĝisdataj. Transloĝintoj bonvolu afable sin anonci al la administranto de la revuo.

Pri abonoj, pagado k.s. oni bonvolu sin turni nur al la *administracio de Esperantologio*, kiun transprenis s-ro asista advokato Eskil Svane, Viggo Rothesvej 40, Kopenhago Chl., Danlando (dana poŝtkonto 2661, Kopenhago).

Pri *redakciaj aferoj* oni daŭre sin turnu al la redaktoro, D-ro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K (bonvolu noti, ke depost septembro 1959 li dum ĉ. unu jaro laboros kiel universitata profesoro sub la adreso: The American University of Beirut, Faculty of Agricultural Sciences, Beirut, Libano).

Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri lingvaj problemoj de la Internacia Lingvo, entute ĉiuj t.n. (laŭ Kalocsay) "kultur-esperantistoj", estas kore invitataj aktive kunhelpi por sukcesigo de tiu ĉi entrepreno. La revuo vekis atenton en rondo ekster nia movado kaj estas rigardata kiel tre grava por la prestiĝo de Esperanto, ne malplej en intelektaj kaj fake lingvistikaj rondo.

Redakcio kaj Administracio de
ESPERANTOLOGIO

N.B. Represo petata.

L. L. Zamenhof - Pionira Poeto

Okaze de la 100-jara Datreveno de lia
naskiĝo (15.12.59)

La fundamentaj, intimaj motivoj de poetoj estas, verŝajne, emociaj, kaj laŭ la ĝisnunaj psikologiaj esploroj pri poezikreado, tiuj motivoj kaŝiĝas, grandparte, vualitaj en la ombra regiono de la subkonscia menso. La poeto ordinaro havas du plenkonsciajn motivojn: deziron esprimi ion belforme, malŝarĝi la psikon per komunikado de iu emocio, iu emocia konflikto, iu forta impreso, iu intelekta dilemo, kaj tiel plu; kaj deziron kvazaŭ ludi inter vortoj, bredi metaforojn, kunmeti interesajn sonojn, fari semantikajn eksperimentojn per pensasocio kaj aliaj rimedoj. Ĉiu granda poeto posedis forte individuecan personecon, plus fortan perceptemon pri la detalaj karakteroj de sonoj kaj vortoj.

Flankaj, aldonaj motivoj tamen ne mankas. Inter la ambicio al renomo, la deziro plaĉi al alia persono, la intenco servi al Dio aŭ al iu politika, etika aŭ religia celo, la venĝosento de la persona satiristo kaj la sorĉemo kiu, kvankam primitiva, eĉ hodiaŭ iom rilatigas aŭtentikan poezion kun magio, troviĝas la flanka motivo de lingva patriotismo. Tiun motivon pluraj gravaj poetoj konsciis plene, eĉ deklaris: ekzemple Milton kaj Dante verkis parte latine, kaj iliaj poemoj respektive anglaj kaj italaj konscie celis (kompreneble inter aliaj celoj) honori la nacian lingvon, ankoraŭ ne estimatan samnivele kiel estis la latina.

Cent jarojn post la naskiĝo de L. L. Zamenhof, aŭtoro de la Internacia Lingvo, Esperanto, kaj pli ol sepdek jarojn post la apero de Esperanto en la mondo, ni povas serioze konsideri la surprize estimandan kvanton de poemoj verkitaj originale en la Internacia Lingvo. La lingva motivo — kvankam pri lingvo ne nacia sed internacia — estis ekde la komenco, kaj ankoraŭ restas, aparte forta inter Esperantaj verkistoj.

Esperanto vivis, vivadas kaj estas nun uzata de multaj homoj same efike kaj tute same naturece kiel la naciaj lingvoj, ĉar la kreinto, Ludoviko L. Zamenhof, estis esence praktika homo, pelita al lingvaj esploroj per etikaj motivoj: la deziro interkomprenigi diversajn naciojn kaj tiel helpi al ilia pacigo. Li deziris, ekde la komenco, krei ne lingvan kuriozaĵon, ne teorie modelan, matematike ordigitan kabinetan lingvaĵon, sed veran lingvon vivkapablan, kiu faciligos ĉiuspecan vortan komunikadon. Tial li ekprovis sian lingvon tuj; li tradukis el diverslingvaj klasikaĵoj, verkis specimenajn leterojn kaj eĉ submetigis la lingvon al la plej severa provo kiun oni povas uzi pri lingvo ankoraŭ ne parolata: li penis verki poemojn per ĝi.

Fakte la sola peceto de primitiva Esperanto — la pra-Esperanto de 1878, kiam Zamenhof estis ankoraŭ gimnaziano — kiu estas ĝenerale konata, kaj kiu multe malsimilas de la nuna lingvo, estas kvarversa strofo.

Post la apero de tiu pra-Esperanto, en privata rondeto, personaj cirkonstancoj, ofte tragikaj, silentigis Zamenhof dum naŭ jaroj. La unua libro pri Esperanto aperis en 1887. Ĝi estis ruslingva broŝureto kiu konsistis el klariga antaŭparolo, malgranda gramatiko, malgranda vortaro Esperanta-rusa... kaj ses specimenoj de la nova lingvo.

Tiuj specimenoj estis: *Patro Nia*; kelkaj versoj el *Genezo*; modela letero; kaj tri poemoj.

La apero de poemoj, eĉ se nur kiel specimenoj, en lingvo kiun, tiuepoke, verŝajne nur unu homo en la tuta mondo perfekte scipovis, atestis grandan seriozecon kaj estis en si mem granda psikologia kaj lingva kuriozaĵo. Pli strange estis, ke kvankam unu el la tri poemoj estis traduko el Heine:

"En sonĝo principon mi vidis..."

du el ili, *Mia penso kaj Ho, mia kor'*, estis originalaj poemoj de L. L. Zamenhof: originalaj pioniraj poemoj, verkitaj en tute esterordinara lingva soleco, de la kreinto de la lingvo mem. Kredeble tiuj poemoj estas unika literatura fenomeno.

Oni tre nature atendus, ke poemoj verkitaj en tiaj cirkonstancoj estus kabinetaj ekzercoj; ke, ne havante la ecojn de aŭtentika poezio, ili je la plej bona eblo nur montrus, ke per la nova lingvo oni povas fari skandebajn kaj rimantajn versaĵojn. Tute male. L. L. Zamenhof estis homo tre malegoisma; kiam li poste iĝis fama, li ĉiam kondutis ege modeste; lia prefero ne paroli pri si mem impresis liajn samepokanojn kiel sincera; sed tiuj du originalaj poemoj estas profunde personaj. Ili estas inter la tre malmultaj intimaj konfesoj de L. L. Zamenhof. Dum la jaroj de granda spirita soleco, suferanta junulo malpezigis sian koron per poemoj — en sia nova lingvo. *Mia Penso* estas kvarstrofa poemo en kvartrokeoj; ĝi fluas melodie, agrable; kaj se la rimoj (laŭ sistemo *ababcdcd*) nuntempe ŝajnas iom banalaj, siatempe ili ne estis tiaj. La poemo estas multe pli ol sensanga kabineta ekzerco. Ĝi rakontas kiel junulo aŭdas amikinson kanti pri espero; kiel ŝi demandas pri lia silentemo: kaj en la tria strofo tiu junulo eksplodas amare:

"Mia penso kaj turmento,
Kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
Al vi iris jam oferoj!

Kion havis mi plej karan —
La Junecon — mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta !”

Tiu oferadinta junulo certe estas la aŭtoro mem.
L. L. Zamenhof tre ŝatis dancadon kaj havis grandan kapablon ĝui societajn plezurojn; sed lia celo postulis eĉ de studento grandan sindediĉon :

”Fajron sentas mi interne,
Vivi ankaŭ mi deziras, —
Io pelas min eterne,
Se mi al gajuloj iras”

kaj tiu poemo finiĝas per sopiro al morto en espero, se la laboro ne povas sukcesi.

Tiu ĉi unua Esperanta poemo, kvankam teknike adekvata, ne estas granda poemo; ĝi gravas pli kiel pionira verko ol kiel artaĵo. La alia originala poemo en la unua libro estas teknike eĉ pli matura kaj kontentiga :

”Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for !
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor’ !

Ho, mia kor’ ! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor’ !
Sufiĉe ! trankviliĝu de l’batado,
Ho, mia kor’ !”

La urĝaj kvinjamboj kaj la subite haltigitaj finaj dujamboj ja sufiĉe bone spegulas la fizikajn ritmojn de forta emocio. Kvankam la imago de korbato kiel simbolo de krizanta emocio estas stereotipa, tiu ĉi poemo eble ankaŭ portas iomete de la mistera profetemo, la organika sinkompreno, de la subkonscia menso : Zamenhof, dum granda parto de la vivo, multe suferis pro grava kormalsano.

Post la apero de la unua libro, la tuta restanta vivo de Zamenhof estis laborplena. Tiu malsana, modesta, malgranda viro faris laborprogramon preskaŭ superhoman : li tradukis, korespondis, organizis, kun heroa sindediĉo al sia etika celo, ĝis la morto. Li estis sendube homo kun granda krea talento kaj krea emo; la kreado de vivkapabla lingvo pruvas tion; sed la lingvokreado verŝajne preskaŭ elĉerpis la plej viglan krean forton de la junaj jaroj :

”Kion havis mi plej karan . . .” !

La kongresaj paroladoj de Zamenhof kelkloke montras la saman emocian energion, la saman personan psikan aŭtentikecon kiel la du pioniraj poemoj; sed lia literatura laboro konsistis plejparte el tradukoj (ĝenerale bonegaj) kaj traktaĵoj. Li verkis dum la restanta vivo nur sep aliajn poemojn.

La Espero estas poemo, tristrofa, okversa, kvin-trokea, kun rimsistemo *ababcdcd* pri la interpaciga celo de Esperanto. Kun la simple impona melodio de Ménil, ĝi estas la tradicia Himno de la Esperanta Movado. Kiel himno ĝi tre bone taŭgas; kiel poemo ĝi havas la mankojn de preskaŭ ĉiuj naciaj himnoj, kvankam la ideoj estas morale pli estimindaj : poezio kaj sloganoj ne facile kunekzistadas.

La Vojo, ankaŭ ofte kantata, estas pli melodia; ritme kaj forme ĝi estas pli subtila, kaj, kvankam la metaforoj estas banalaj, ili estas tiel lerte kunmetitaj ke la tuto ankoraŭ portas ian stimulan emocian urĝecon :

”Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l’sorto, nek moko de
l’homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita,
Ĝi estas, la voj’ elektita”.

La regula akcento de Esperanto, sur la antaŭlasta silabo, kompreneble faciligas la uzon de trokeoj kaj amfibrakoj, same kiel la sama regulo de la pola lingvo. (Zamenhof estis rus-pola hebreo en la litova regiono de la tiama cara imperio. Lia gepatra lingvo plej probable estis la rusa, kies akcento estas varia; sed li perfekte scipovis la polan). Sed la uzo de amfibrakoj en tiu poemo estas tre viva kaj vigla. Emocio ĉeestas, kaj la fizikaj ritmoj de persista laboremo. La poemoj daŭras pri necesa penado kaj pri ”l’espero, l’obstino kaj la pacienco”. Ĝi estas, iasence, kuraĝiga poemo por iu ajn kiu laboras por celo ankoraŭ minoritata.

Zamenhof verŝajne ŝatis amfibrakojn, ĉar li uzis ilin duan fojon en sia poemo *Preĝo sub la verda standardo*, ideo lia plej profunda poemo. En tiu sesstrofa poemo Zamenhof esprimas siajn ideojn pri mondreligio, kaj preĝas al la Dio de la tuta homaro, petante pacon kaj la unuiĝon de la homaro, promesante labori pro tiu celo. Dum multaj jaroj amikoj devigis al Zamenhof ideo malfortigi la poemon, forigante la sesan strofon, laŭ kiu kristanoj, hebreoj kaj mahometanoj ĉiuj estas filoj de Dio; la kristanaj amikoj en Francujo timis, dum la Dreyfus-epoko, ke tiu koncepto kompromitis Esperanton en la okuloj de multaj.

Ankaŭ teknike tiu poemo estas inter la plej bonaj, kiujn Zamenhof verkis. La metriko estas pli interesa; uzante kvar, tri aŭ du amfibrakojn, li sukcesas doni urĝecan movadon al ĉiu strofo kaj fini ĉiun strofon per emfaza, kvazaŭ liturgia paŭzo. Denove ni sentas, tra la relativa banaleco de la imagoj, la sincerecon de tiu soleca, miskomprenita kaj humana spirito :

"Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,
 Fortego, la mondon reganta,
 Al vi, granda fonto de l'amo kaj vero
 Kaj fonto de vivo konstanta,
 Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,
 Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,
 Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,
 Hodiaŭ ni preĝas".

El la kvar restantaj poemoj de tiu unike stranga poemaro, tri ne meritas multan komentadon. Al la *Fratoj*, kiu aperis en 1889, estas la plej longa poemo de Zamenhof; ĝi enhavas dekkvar kvarversajn strofojn. Zamenhof sendube verkis ĝin, eble rapide, por edifi kaj kuraĝigi siajn kolegojn dum la plej fruaj jaroj de la Esperanta Movado. Espereble ĝi tiel efikis, sed kompare kun liaj aliaj poemoj ĝi estas ĝene mallerta metrike kaj eĉ vortorde; tute kejlaj vortoj troviĝas en ĝi multfoje, dum la aliaj poemoj de Zamenhof estas klaraj, rektaj, koncizaj; la senduba sincereco de la kuraĝiganto estas sufokita en la malbona versfarado. Al la *Esperantisto* estas ideo kaj cele tre simila, sed teknike multe pli bona. Ĝi estas la sola originala poemo en kiu Zamenhof uzis jamban ritmon. *Saluto al Verda Radio* estas sesversa kuraĝigo al Esperanta eldoninto de nova libro, kaj gravas nur kiel unu inter multaj atestaĵoj pri la konstanta komplezemo de tre okupita, trolaboranta homo.

Tamen, la lasta konata poemo de Zamenhof estas io alia. Ĝi aperis unue dum 1909, kiam Esperanto jam disvastiĝis kaj per kelkaj internaciaj kongresoj jam plenpruvis sian vivkapablon.

Pluvo

Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
 Senĉese, senfine, senhalte,
 El ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
 Are gutoj frapiĝas resalte.

Tra la sonoj de l'pluvo al mia orelo
 Murmurado penetras mistera,
 Mi revante aŭskultas, mi volus
 kompreni,
 Kion diras la voĉo aera.

Kvazaŭ ia sopir' en la voĉo kaŝiĝas
 Kaj aŭdiĝas en ĝi rememoro...
 Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj
 ĝoja,

En mi batas konfuze la koro.

Ĉu la nuboj pasintaj, jam ofte viditaj,
 Rememore en mi reviviĝis,
 Aŭ mi revas pri l'sun', kiu baldaŭ
 aperos,
 Kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis?

Mi ne volas esplori la senton misteran,
 Mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;
 Ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas,
 Al la freŝo la koro min tiras.

La unuaj poemoj de Zamenhof fontis el personaj emocioj; sekvis epoko de malfacila organizado kaj propagando, dum kiu la lingvokreinto ne havis tempon por poluri sian nepre ekzistantan, kvankam durarangan, poezian talenton; dum la malfruaj jaroj de plena kaj multrilate tragika vivo, nova poemo persona aperas, poemo tute ne, kiel la edifaj poemoj de la plej streĉaj streĉaj propagandaj jaroj, citebla dum publika kunveno por kuraĝigi; sed la plej poezie aŭtentika, la plej teknike matura, inter la naŭ poemoj de Zamenhof.

Objektiva aŭskultanto konfesos, ke la delikate variigita ritmo kaj la subtile insida uzo de *s* kaj *v*, la diskretaj aliteracioj, la intenca ŝvebado inter observemo pri konkreta fenomeno, kaj duone aludita spirita alegorio, prezentas poezion malsimilan al la pioniraj poemoj. Zamenhof, granda geniulo sur la kampo de lingvo, tre granda homo laŭ moralaj kriterioj, ne estis granda poeto laŭ iu ajn absoluta senco; sed tiu poemo en plenmatura Esperanto vekas senton de vera bedaŭro ke li ne verkis aliajn poemojn tiel personajn kaj artismajn. Sed li estis jam lacega, malsana; perfido de iamaj amikoj batis lin; malriĉeco longe muelis lin; cirkonstancoj postulis de li korespondan laboron apenaŭ kredeblan; kaj tiu "En mi batas konfuze la koro" ja ne estis nur literatura kliŝo. Ok jarojn poste, elĉerpita, frakasita per la tragedio de la unua mondmilito, Zamenhof mortis, oficiale kvindekjara, fizike kaj spirite multe pli aĝa, tute elĉerpita. Estas kortuŝe, ke lia lasta poemo esprimis dankemon pro momento de natura freŝeco. Estas bedaŭrinde, ke la nova promeso de tiu poemo neniam plenumiĝis.

Zamenhof, kreinto de la Internacia Lingvo kiu vere funkcias vive, havis kreaĵon genion; nur parteto de tiu krea genio estis libera por flui en versojn. La eksterordinareco mem de la cirkonstancoj, en kiuj la unuaj Esperantaj poemoj estis kreitaj, meritigis al L. L. Zamenhof malgrandan niĉon en la historio de la mondliteraturo. Ke homo verkis poemojn per lingvo tiam ankoraŭ ne parolita, kaj ke la lasta poemo montras imponan artisman evoluon, estas ja sufiĉe mirigaj faktoj.

Sed Zamenhof pioniris ne nur lingvon, sed literaturon. Mi havas antaŭ mi Esperantan libron ĵus eldonitan: *Esperanta Antologio — Poemoj 1887-1957*. Ĝi estas antologio nur: tio estas, ĝi celas reprezenti al la publiko la plej signifajn Esperantlingvajn poetojn, per iliaj plej bonaj poemoj. Komprenneble Zamenhof estas la unua en la libro. Sekvas lin aliaj pioniroj de la plej frua epoko: Grabowski, Devjatnin, Schulhof, Feliks Zamenhof (frato de la lingvokreinto) kaj aliaj. La poemoj de tiu frua epoko estas interesaj, ofte, pli historie ol vere poezie; sed en la sinsekvaj paĝoj de la Antologio la rapida evoluo de Esperanto al plena matureco por poezio klare evidentiĝas. La ampleksa volumo — 543 paĝoj de poemoj mem, se ni dealkulas glosojn, klarigojn kaj biografiajn notojn —

prezentas naŭdek seriozajn Esperantajn poetojn, per iom pli ol 350 poemoj. Difini el kiu lando venis kelkaj el tiuj poetoj estus malfacile, pro ekziloj, landlimŝanĝoj kaj apartaj cirkonstancaj anomalioj, sed oni povas certe diri ke tiu Antologio reprezentas almenaŭ 35 landojn. Kelkaj Esperantistaj poetoj jam indas je komparo al nacilingvaj poetoj: Kálmán Kalocsay, hungaro, plenmaturigis la lingvon teknike kaj montris multajn ne antaŭe komprenitajn esprimkapablojn de Esperanto per amaso da vere belegaj poemoj laŭ romantika tradicio, sed ofte kun tute aktuala komplikeco. Kalocsay ankaŭ verkis *La Arto Poetika* en Esperanto, kaj multaj postsekvantoj ŝuldas al li sian teknikan scion kaj memkritikkapablon. Gyula Baghy, alia hungaro, kelkfoje verkis malforte, sloganece, sed ofte tre forte kaj individuece. Gravaj estas la rusoj Nikolai Hohlov kaj Eŭgeno Miĥalski; la hungaro Lajos Tárkony; la latvo Nikolai Kurzens, majstro pri koncizaj emociaj bildoj kiuj estas eble la plej facile parkereblaj inter ĉiuj Esperantaj poemoj, kaj Raymond Schwartz, franco, kiu iĝis la unua kompetenta bonhumorpoeto en Esperanto.

La reprezentantoj de la nuna epoko inkluzivas plurajn poetojn kies poemoj estas ne plu kompetentaj imitaĵoj — eĉ Kalocsay kaj Kurzens, fakte, estas ofte multe pli ol nuraj imitantoj — sed veraj originalaĵoj laŭ ĉiuj kriterioj. La skoto William Auld, influita ne nur per la britaj tradicioj sed per la eksperimentoj de T. S. Eliot kaj Ezra Pound, verkis metafizikajn poemojn profundajn kaj tre individuecajn; la svisdevena skoto Reto Rossetti, la ĉeĥo Karolo Piĉ, la anglo Arthur Foote, la brazilano Geraldo Mattos, la ĉeĥo Jiří Kořinek, la islandano Baldur Ragnarsson, la sudafrikano Edwin De Kock, ekzemple, vere verkas por kulture matura publiko, per rimedoj neniel arkaikaj aŭ stereotipaj. La poezio de la juna sed vige vivanta lingvo jam meritas seriozan atenton.

Esperanto estas, fakte, lingvo kiu multrilate tre taŭgas por la poezio. Pro la ekstrema simpleco de la gramatiko, kaj precipe ĉar iu ajn radiko povas alpreni iun ajn gramatikan finaĵon kiu donas sencan. (Ekzemple, verbo substantiviĝas, adjektivo aŭ eĉ prepozicio verbiĝas). Esperanto estas lingvo eksterordinare fleksebla, kun mirindaj kapabloj por esprimriĉega koncizeco. Ĝia vortaro, kiu nature ŝajnis iom malriĉa dum la frua epoko, estas nun preskaŭ adekvata por esprimi ĉion, kion menso povas koncepti. Ĝi kapablas ĉerpi imagojn kaj aludojn ne el nacia, sed el monda kulturo.

Multaj oponentoj de la Internacia Lingvo, diras, ke ne estas eble verki poemojn per tia lingvo. Nuntempe ili nur montras sian mankon de informoj, dirante tion. Sed la maturaj Esperantistaj poetoj devas danki, pro la poeziaj ebloj de la lingvo, al la soleca pioniro, L. L. Zamenhof, kiu, dum la procezo mem de lingvokreado, provis sian lingvon per poemetoj, kaj lasis post si tiujn strangajn atestaĵojn de sia nobla koro, de sia lingva genio, kaj de ebla granda poeto, kies krea genio elĉerpigis tro frue per lingvokreado kaj rutina laborego. Esperanto mem estis la ĉefa poemo de mondpoeto Zamenhof.

Marjorie Boulton, M.A., B. Litt. Anglujo.

Rimarko :

La supra artikolo de Marjorie Boulton apartenas al serio de artikoloj, kiujn verkis la kunlaborantoj de CED en la senco de la p-to 4 de la Baza Programo (vidu la rubrikon de CED en tiu ĉi numero). Marjorie Boulton estas lektorino pri la anglaj lingvo kaj literaturo kaj vicdirektorino en kolegio. Ŝi estas aŭtorino de pluraj verkoj en la angla kaj en Esperanto, poeto en ambaŭ lingvoj. La kunlaborantoj de CED kaj la informaj fakoj bv. prizorgi la tradukon de la artikolo kaj ĝian aperigon en la naciaj lingvoj. La artikolo taŭgas precipe por literaturaj kaj ĝenerale kulturaj revuoj.

SVEDA SOMERA SEMAJNO



okazos ĉijare 9. — 16. aŭg. kaj kiel en antaŭaj jaroj en **Frostavallen, Höör** (apud Malmö), Svedujo. La elektita temo estas

LANDOJ - POPOLOJ

kun atento pri orienta kaj okcidenta kulturaj valoroj

Pri la aktuala agadtemo de Unesko prelegos Prof. D-ro Ivo Lapenna, Prof. D-ro N. Kawasaki, doc. S. Pragano, lic. Tib. Sekelj.

La kultursemajno okazos tuj post la kongreso en Varsovio, kaj estos eble partopreni ambaŭ aranĝojn.

Informojn kaj aliĝilojn oni petu ĉe s-ro Jan Strönnne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo. Rekomendinde estas aliĝi tre frue.

CED

Centro de Esploro

kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

1560 RADIOELSENDOJ EN 1958

Laŭ la statistiko, kiun ellaboris la kunlaboranto de CED por radio, s-ro G. Larglantier el Parizo, la nombro de radioelsendoj en la Internacia Lingvo en la jaro 1958 estis entute 1560 kaj ili daŭris kune precize 459,35 horojn. Entute regule elsendis en Esperanto 17 radiostacioj en Aŭstrujo, Brazilo, Bulgarujo, Francujo, Gvatemalo, Hispanujo, Italujo, Jugoslavio, Nederlando, Svedujo kaj Svislando.

En la jaro 1957 estis entute 1250 radioelsendoj en Esperanto kaj ili daŭris precize 317 horojn. Sekve, la nombrokresko de elsendoj kompare kun 1957 estas 310, dum la kresko de horoj estas preskaŭ 143. Ankaŭ kompare kun 1956, kiu havis entute 1428 Esperanto-elsendojn, estas kresko de 132.

Jen, por komparo, la nombro de Esperanto-elsendoj ekde la jaro 1952, kiam fondiĝis CED: en 1952 estis 740 elsendoj, en 1953—844, en 1954—1012, en 1955—1168, en 1956—1428, en 1957—1250 kaj, fine, en 1958 estis 1560 elsendoj. Kun la escepto de 1957 estis, do, daŭra kresko de la Esperantlingvaj elsendoj.

Espereble en la Zamenhof-Jaro la radiostacioj, kiuj jam elsendas en la Internacia Lingvo, plioftigos kaj plilongigos siajn programojn, dum aliaj stacioj enkondukos Esperantlingvajn elsendojn.

ARTIKOLOJ OKAZE DE LA ZAMENHOF-JARO

Plenumante la punkton 4 de la Baza Programo por la Zamenhof-Jaro, CED organizis verkadon, kolektadon kaj distribuon de artikoloj. Ĝis la fino de januaro jenaj kunlaborantoj de CED verkis artikolojn por memorigi la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof:

Prof. D-ro Edmond Privat, "D-ro L. L. Zamenhof (1859—1959)", publikigita en la januara numero de "Esperanto";

Marjorie Boulton, M.A., B. Litt., "L. L. Zamenhof — Pionira Poeto", publikigita en ĉi tiu numero; *Agregacia Profesoro Juan Régulo-Pérez*, "Lando de Libereco, Egaleco kaj Frateco";

D-ro A. Albault, "D-ro L. L. Zamenhof, Oftalmologo — Iniciatinto de la Internacia Lingvo";

D-ro G. F. Makkink, "Zamenhof en la Evoluo de la Komunikado";

D-ro A. Mildwurf, "Ludoviko Zamenhof kaj lia Vivo";

Dipl. Ing. Rudolf Haferkorn, "Esperanto kaj la Evoluo de Scienco kaj Tekniko";

Julia Isbrucker, "Unu Mondo — Unu Lingvo";

Prof. René Maurice Fréchet, Membro de la Sciencaj Akademioj de Francujo, Pollando kaj Nederlando, pri speciala matematika temo (publikigota en Sciencia Revuo);

John Francis, "Integro kaj Latentoj en la Verko de Zamenhof";

D-ro W. P. Roelofs, "D-ro L. L. Zamenhof, lia Verko kaj ĝia Signifo por la Scienco kaj Tekniko";

David Kennedy, "Esperanto — Heredaĵo al la Infanoj de la Mondo";

Prof. D-ro Hugo Sirk, "Lingvaj Spertoj en la Praktiko de la Scienco";

Rev. F. Moravec, "La Internacia Lingvo kiel Familia Lingvo".

Pluraj aliaj eminentaj kunlaborantoj de CED promesis verki artikolojn en la Zamenhof-Jaro.

La artikoloj de la kunlaborantoj de CED estos senditaj al la landaj Informaj Fakoj kaj al diversaj rektaj kunlaborantoj por traduko kaj publikigo en la nacilingvaj revuoj kaj gazetoj. Kelkaj el la artikoloj estos publikigitaj en la revuo "Esperanto" dum 1959. Ĉiujn artikolojn ricevos ankaŭ la membroj de la Internacia Organiza Komitato kaj la landaj asocioj. Sekve, se iu leganto deziras helpi per tradukoj aŭ havas eblecon publikigi iun el la artikoloj en iu gazeto aŭ revuo, aŭ alimaniere utiligi ĝin, li bonvolu sin turni al sia landa asocio, landa informa fako aŭ la membro de la IOK por tiu lando, sed ne al CED, kiu absolute ne povas korespondadi ankaŭ kun unuopuloj tra la mondo.

Donacoj por CED en 1958

	£	ŝ	p
La stato de la 24-a de novembro 1958	131	11	9
S-ino E. Wolfskel, Britujo	10	0	0
H. V. Rasmussen, Danlando	10	0	0
S-ro Groendijk, Nederlando	9	5	
N.N. en V., Nederlando	9	5	
S-ro Baaten, Nederlando	5	8	
D-ro W. P. Roelofs, Nederlando	2	10	
N.N. en V., Nederlando	9	5	
B. B. Beaumont, Britujo	2	0	0
J. Eisele, Usono	4	8	
S-ino I. A. Döbken-Mulder, Nederlando	9	5	
P. Bouvier, Svisujo	2	0	9
S. Flego, Francujo	2	4	0
F-ino E. Maasbommel, Nederlando	18	3	

La stato de la 31-a de decembro 1958 142- 5- 7

Korekto: En la novembra numero de "Esperanto", rubriko de CED, aperis informo, ke s-ro A. Olsson, Svedujo, donacis £ 1-7-7. Fakte temas ne pri A. Olsson, sed pri S-ro Hjalmar Olsson, Svedujo. Ni petas korekti tion kaj ankaŭ ni pardonpetas pro tiu erareto. En la sama numero estas alia donaco de A. Olsson, Svedujo, de £ 13-15-11 kaj tiu nomo kaj sumo estas korektaj.

Donacoj por CED en 1959

	£	§	p
S-ro Blondeaux, Francujo		3-	6
E. Woessink, Nederlando	1-	8-	2
A. Blid, Svedujo		13-	4
I.A.J.E.		1-	8
E. S. kaj E. J. Frost, Danujo		15-	5
A. Berdan, Aŭstrujo		4-	8
A. Persson, Svedujo		7-	11
La stato je la 31-a de jan. 1959		3-14-	8

Koran dankon al ĉiuj donacintoj.

Donacojn por CED oni povas sendi al la Centra Oficejo de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C. Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, rue de Chabrol, Paris, 10, Francujo; al la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA aŭ al CED rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Ligue Française "Pro Unesco"

estas la nomo de grava franca asocio kultura, agnoskita de la Ministerio por Nacia Edukado, kiu celas

- diskonigi la idealojn kaj celojn de UNESKO, kaj kunhelpi je la realigo de tiuj idealoj;
- grupigi, sur nacia tereno, ĉiujn fervorajn amikojn de UNESKO, sendepende de politikaj aŭ ideologiaj konsideroj.

Inter la diversaj eroj de la aktivecprogramo de *Ligue Française "Pro UNESKO"* nepre interesas nin 1-a punkto 4, kiu postulas kuraĝigi la *gejunulojn lerni kaj praktikadi la Internacian Lingvon, agnoskitan de la 8-a Ĝenerala UNESKO-konferenco en Montevideo.*

En la kadro de la diversaj aktivecoj de *Ligue Française "Pro UNESKO"*, funkcias diversaj servoj, nome

- *Gazetservo*, je la dispono de ĉiuj UNESKO-amikoj dezirantaj aboni kaj interŝanĝi kulturajn gazetojn;
- *Libro-servo*, faciligonta al interesiĝantoj starigon de kultura biblioteko je malaltaj kostoj;
- *Instrua servo perletera*, haviganta konsiderindajn rabatojn al gejunuloj, kiuj deziras sekvi kursojn ĉe konataj lernejoj per korespondado;
- *Interrilat servo*, por korespondemuloj kaj interŝanĝemuloj;
- *Turisma servo*, aranĝanta grupajn vojaĝojn kaj ferian restadon;
- k.a.

Estas aparte notinde, ke, en la informaj cirkuleroj pri la ĉi supre menciitaj servoj, oni trovas utilajn sciigojn pri la lernado kaj praktikado de Esperanto; nia lingvo fakte troviĝas tie klasifita samvalora kiel la aliaj lingvoj kaj ankaŭ kiel la diversaj fakoj instruaj kaj kulturaj. Tio devas esti instigo por niaj francaj Esperantistoj celkonsciaj, subteni laŭeble la strebadon de *Ligue Française "Pro UNESKO"*; por tio ili aliĝu kiel membro, kaj diskonigu larĝe la utilajn servojn de tiu asocio, senkondiĉe disponeblaj de ĉiu ajn. Oni petu la franclingvan informilaron ĉe "*Pro UNESKO*", 33 rue des Apennins, Paris (17e), aldonante francan leterpoŝtmarkon, respektive respondkuponon.

A. Lienhardt

P.S. — La komitato volonte interrilatos kun kapablaj aktivuloj alilandaj, kiuj deziras starigi en sia lando similcelan asocion kun simila nomo, ekzemple *British Leago "Pro UNESCO"*, aŭ *Deutsche Liga "Pro UNESCO"*, k.s. Tiaj asocioj povos fariĝi valoraj helpantoj por rapidigi dezirindan agnoskon kaj uzadon de nia lingvo, fare de altaj instancoj kaj de la ĝenerala publiko.

La Internaciaj Konkursoj 1959

Stato je la 31-a de januaro
Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Finnlando	1935	1675	86.56
2.	Svislando	1755	1465	83.48
3.	Belgujo	1480	1105	74.66
4.	Nederlando	5119	3395	66.32
5.	Britujo	6093	4001	65.66
6.	Danlando	2639	1695	64.23
7.	Usono	2816	1770	62.86
8.	Hispanujo	1999	1175	58.78
9.	Francujo	7066	4091	57.90
10.	Germanujo	6951	3220	46.32
11.	Norvegujo	1991	855	42.94
12.	Jugoslavio	5690	1715	30.14
13.	Svedujo	6420	230	25.83
14.	Italujo	3980	950	23.87
15.	Pollando	6635	1460	22.—
16.	Brazilo	8255	1172	14.20

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Kanado	435	355	81.61
2.	Portugalujo	615	395	64.23
3.	Izraelo	255	120	47.06
4.	Novzelando	878	390	44.42
5.	Sudafriko	215	60	27.91
6.	Aŭstralio	1280	350	27.34
7.	Aŭstrujo	1360	365	26.84
8.	Japanujo	1150	280	24.35
9.	Islando	270	35	12.96
10.	Maroko	457	41	8.97
11.	Argentino	615	50	8.13
12.	Urugvajo	275	10	3.64

Ĉiu larĝe pasu 100% en la Zamenhof-Jaro!

Tradukado Nacilingven

Tra la fendo de mia pordo mi regule ricevadas diversajn danlingvaj gazetojn, kiujn kelkaj ambasadorejoj en Kopenhago senkoste dissendas informcele (eble iufoje pli ĝuste diri propagandcele). Temas parte pri "okcidentaj" landoj, ekz. Usono, parte pri "orientaj" landoj, ekz. Sovetunio. La gazetoj enhavas — krom iaj propagandaĵoj — multe da legindaj informoj pri la teknika-ekonomia kaj kultura vivo en la koncernaj landoj. Kvankam ofte polemikaj, tiuj gazetoj sendube havas ankaŭ sian pozitivan signifon en la grava kaj necesa proceso de kreskanta interproksimiĝo kaj interkontaktiĝo inter "okcidento" kaj "oriento", inter ĉiuj landoj. Koni, scii estas kompreni!

Sed legante tiujn ĉi gazetojn, kies materialo plejparte estas tradukita, oni trovas, ke la intenco de la eldonantoj ofte restas neplenumita. La kaŭzo estas traduka mallerto. Ĉiam denove ripetiĝas la malnova sperto, ke ne sufiĉas traduki nur gramatike korekte, sed la teksto devas plene adaptiĝi al la spirito de tiu lingvo, en kiun ĝi estas tradukita. Iu vorto en unu lingvo povas esti tradukata per la precize respondanta vorto en alia lingvo, kaj la vorto povas esti adekvata en multaj rilatoj, dum ĝi en aliaj rilatoj, metita en alia kunteksto, estas nenatura, ĉu afektema, ĉu tro solena, kvankam en la originala lingvo ĝi estas prete akceptata de la leganto kiel tute natura esprimo.

Pensante pri unu el la priparolitaj informgazetoj elsaltas en mia memoro la vorto "sovethomo". Tiu esprimo ĝeneraligis en la postrevolucia rusa lingvo kaj sendube enhejmiĝis en ĝi kaj fariĝis natura esprimo. En aliaj lingvoj, almenaŭ en "okcidentaj", oni kredeble bezonas ĉirkaŭskribi tian esprimon, por ke ĝi ne donu impreson de troa nacia memkontento, mi emus diri kun ioma ŝovinisma nuanco, kiun eble neniu rusoj sentas. Uzante en dana lingvo krudan tradukon de la vorto "sovethomo", oni vekas nedeziratajn sentojn ĉe la leganto, almenaŭ tio estas mia persona impresio. Same, por preni respondan ekzemplon el nia Internacia Lingvo, estas tute ĝusta kaj subteninda konsilo, kiun donas D-ro Lapenna, kiam li avertas, ke oni ne uzu nacilingve la vorton "samideano" aŭ krudan tradukon de tiu vorto, simple ĉar ĝi vekas nedeziratajn asociaciojn pri aneco de ia stranga sekto kaj pridubigas la sobrecon de nia praktike laboranta movado. Kaj paroli pri "nia kara majstro" en nacilingva artikolo estus alia ekzemplo pri manko de lingva takto aŭ de psikologia sento.

Kiel parto de la koordinataj klopodoj dum la nuna Zamenhof-jaro por doni informojn pri Esperanto kaj ĝia iniciatoro, multaj artikoloj, verkitaj de kompetentuloj en diversaj landoj, estos tradu-

kataj en dekojn da diversaj naciaj lingvoj. Estas klare, ke la sukceso de tiu tuta aktiveco dependas de la kvalito de tiu tradukado nacilingven. La plej eminente verkita artikolo povas en la manoj de nesperta amato esti tute fuŝata, tiel ke la efiko de artikolo estas aŭ nula aŭ rekte malutila (se entute oni sukcesas ĝin akceptigi por la preso). Nu tiu fakto estas tiel evidenta kaj bone konata, ke atentigo pri ĝi povas ŝajni tute superflua. Tamen mi kuraĝas aserti, ke ni preskaŭ ĉiuj subtakdas la malfacilaĵojn ĉe tradukado, kaj ne malpleje ĉe tradukado nacilingven.

Tiun ĉi artikolon instigis tralego de la bela kaj tre sobra artikolo pri Zamenhof de Edmond Privat en la ĉijara januara kajero de "Esperanto". Kiel delikata estas la stilo de Privat, sed kiom vundebla, se oni ne trafas ĝian tonon volante ĝin redoni en alia lingvo. Ĝuste tiu artikolo estos tradukata en multajn lingvojn.

Estis unu frazo en tiu artikolo, kiu igis min ekpensi pri la problemo. Parolante pri la ideo de juna Zamenhof, ke komuna lingvo forigus parton de la baroj inter homoj, Privat skribas: "Li profunde sentis la fundamentan unuecon de la homaro sub la diversaj apartiĝoj kaj akcentas tiun senton en siaj postaj poeziaj verkoj, ĉar li havis poetan kaj profetan spiriton".

Perfekte esprimita karakterizo, sed la frazo postulas lingvan takton de tradukanto. Se mi volas ĝin redoni en mia tempera norda lingvo, mi, ekz. ne havus la rajton dane paroli laŭvorte pri poeta kaj profeta **spirito**, kvankam en multaj aliaj rilatoj la rekta laŭvorta traduko estus la ĝusta. Volante doni juston al la stilo de Privat, mi devus aŭ ĉirkaŭskribi la vorton **spirito** kun ĝia kunteksto, aŭ trovi alian vorton ĝin anstataŭantan, por ke mi ne falu en la abismon de sentimentaleco, kiam mi celus trafi la profundon de homaj sentoj.

Mi ne intencas ĉi tie doni instrukcion pri tradukado, neebla tasko. Mia sola deziro estas veki ĉe tiuj bravaj kunlaborantoj, kiuj prenas sur sin la necesan taskon traduki tiajn artikolojn en sian nacian lingvon, la senton de humileco antaŭ la tasko, la volon de memkritiko, la deziron serĉi kompetentan helpon por konstrua kritiko, kiam la malneto de la traduko estas skribita.

Kiam tiu rezulto de via strebado kuŝas sur via tablo, redonanta ne nepre la vortojn mem, sed la spiriton de la originalo, tiam konsideru vian laboron absolute nepreta! Post klopodado pri perfekta reverkado de la artikolo en via lingvo, vi finfine ne plu povas rigardi per freŝaj okuloj la manuskripton. Je tiu momento vi devas serĉi unu, aŭ pli bone du aŭ tri personojn, al kiuj vi petu, ke

Daŭrigo sur p. 54.

En Wien la ĉefurbo de Aŭstrio Staras Zamenhof-monumento

Kiel antaŭe informite en nia revuo, la 27-an de julio okazis la inaŭguro de Zamenhof-Monumento sur Börseplatz en la centro de Wien.

Alparolis en ĉeesto de pli ol 300 personoj Ministeria Konsil. *D-ro Heppner* nome de la en Rusujo forestanta protektoro, la aŭstria kanceliero *Inĝ. Raab*, sekvis la reprezentanto de la Instruministro *D-ro Drimmel*, nome Min. Kons. *D-ro Feits*, la afergvidanto de la Pola Ambasadorejo en Wien *s-ro Henryk Kessler*, nome de la Teknika Altlernejo Univ. Prof. *D-ro Hugo Sirk*, *Hans Steiner*, la iniciatinto de la Zamenhof-Monumento en urbo *Wörgl* (Tirolo), Honorprezidanto de Aŭstria Esperanto-Federacio em. ministro *D-ro Hans Frenzel*, prezidanto de la plej supera kontroloficejo, la reprezentantoj de 16 nacioj kaj la inicianto de la Monumento Kort. Kons. *Hugo Steiner*. La vicurbestro en foresto de la urbestro, *s-ro Weinberger*, iama ministro, transprenis la Monumenton en la gardon de la komunumo Wien.

La ĝeneraldirekcio de la Poŝtoj disponigis specialan poŝtoficejon kun specialstampo, montrante la bildon de Zamenhof kaj Esperantotekston.

Jen la parolado de la Pola Amabasadorejo :

"La popolo de Aŭstrio kaj via bela urbo Wien hodiaŭ honoras viron, kiu — por paroli kun Heine — estis glavo kaj flamo en la servo de afero, al kiu li estas oferinta la tutan forton de sia personeco. *D-ro Ludwik Zamenhof*, aŭ *D-ro Esperanto*, kiel li mem sin nomis, dum sia tuta vivo estis pioniro por la popolinterkompreniĝo, konvinkita adepto de la pac-ideo, proklamanto de la humaneco, en la internaciaj rilatoj. Li, la okulkuracisto en Warszawa, deziris sanigi la homaron de la blindeco de l'malsano kaj de la naciismo. La de li kreita Esperanto estas fariĝinta — ne nur dank' al liaj specialaj lingvistikaj ecoj sed ankaŭ dank' al lia interna, humana penso — la sola mondhelplingvo, kiu forte tenis sian lokon. Tio signifis despli, ĉar Zamenhof estas surpaŝinta la penigan vojetojn de reformulo kaj pioniro. Ofte li devis elteni kontraŭagojn kaj malamikaĵojn ĉiuspecajn de tiuj, kiuj ĝuste en Esperanto estis ekkonintaj uzeblan instrumenton por la popolinterpaciĝo kaj interkompreniĝo. Liaj kontraŭuloj je tio ĉiam ne atentis la fakton aŭ deziris tiun mortigi per silento, ke la de Zamenhof elpensita lingvo nur estu hel-pilo. Zamenhof certe neniam havis la pretendon,



La personoj sur la foto de maldekstre : 1. Min. Kons. *D-ro Feits* (Ministerio de Instruado), 2. em. Ministro, vicurbestro de Wien, *Weinberger*, 3. Univ. Prof. *D-ro Sirk*, 4. Prof. *Müller-Weidler*, la verkinto de la monumento, 5. *D-ro Halbedl*, landestro de AEF por Stirio, 6. *Vigar* (Anglujo), 7. Kort. Kons. *Hugo Steiner*, 8. *ino Gaston* (Hispanujo), 9. *Konrad Deubler* (Germanujo), 10. *Karl Dürschmid*, landestro de Karintio, 11. *Hans Steiner*, landestro de Tirolo.

povi forpuŝi aŭ anstataŭigi pere de Esperanto la kulturlingvojn de l'mondo, sanktigitaj per tradicio kaj historio. Nun 70 jarojn post sia estiĝo Esperanto estas pli viva ol iam, jam delonge ĝi atingis certan mondcivitanecon kaj multflankan rekonon, en plej lasta tempo inter aliaj flanko de UNESKO, kaj ne plu estas forpensebla de nia kultura heredaĵo. Sed la ideoj, kiuj estis la kaŭzo por la kreo de la Esperantolingvo, la ideo de l'paco kaj hominterkompreniĝo, nuntempe estas maturiĝintaj al la ĝenerale estiĝanta ekkono, ke la alternativo por la paco ne plu signifus por nia civilizo militon, sed detruigon. Se Ludwik Zamenhof ankoraŭ vivus, li rajtus esti fiera pro sia aparteneco al Polujo, lando, kiu, kvankam ĝi tiom estas suferinta per barbara naciismo, ne malamas iun popolon kaj estas preta, kulturi rilatojn kun ĉiuj nacioj sen konsidero de iliaj vivmaniero kaj mondperceptoj sur bona kaj paca bazo. Se Ludwik Zamenhof ankoraŭ vivus, li rajtus esti fiera pro sia patrolando, kiu vorte kaj age energie pledas por militista kaj spirita malarmado kaj kies plano al kreado de nuklear-libera zono en Eŭropo estas renkontinta tiom da morala subteno en la tuta mondo. Mi pensas, ke ne estas hazardo, se la unua grandurbo, kiu donas al *D-ro Zamenhof* monumenton, ĝuste estas Wien. Wien ja estis ĉiam tiel akceptema por ĉio humana kaj tolerema, ja sur Wien-a grundo multaj novaj ideoj estiĝis, kiuj kunhelpis formi la mondbildon de nia epoko. Fine ne estas hazardo, ke ŝtato, kiu apogas sian resaniĝon sur paco kaj neŭtraleco, donacis al la pola viziulo de la mondpaco tiun ĉi indan monumenton. La nuna kaj ankoraŭ pli la estonta generacio do komprenu la monumenton de la polo Zamenhof en la koro de la urbo Wien tiel kia ĝi estas, malkaŝa konfeso de la civitanoj de tiu urbo kaj de ĉiuj aŭstrianoj, kiuj estas bonvolaj, al la idealoj de l'paco kaj konkordo de ĉiuj popoloj".

Klubo Esperantista de Malmö, Svedujo

Eta skizo pri la agado

Organizado.

La klubon gvidas Estraro, kiu krom *prezidanto*, *vicprezidanto*, *sekretario*, *vicsekretario* kaj *kasisto*, kies agadoj por ĉiuj estas kompreneblaj, konsistas el *bibliotekisto*, kiu traktas ankaŭ la arĥivon de la klubo kun materialo i.a. por ekspozicioj, *studgvidanto*, kiu prizorgas la aranĝon de la kursoj, interkonsentas pri kursgvidantoj kaj estras la informadon, kaj *du klubmastroj* (= programsekretarioj), kiuj al la estraro proponas kaj poste prizorgas la klubajn programojn.

La klubo havas jare nur 5 kunsidojn, kiuj traktas organizajn problemojn, kaj ĉe kiuj protokoloj estas pretigitaj. La estraro decidas pri ĉiuj aferoj intertempe.

Pluraj komitatoj kaj komisiitoj por diversaj taskoj ekzistas flanke de la estraro. Speciala elektoprepara komitato prizorgas la proponojn al la klubo por ke ne estu troaj serĉado kaj diskutado dum la kunsidoj. La elektoprepara komitato havas tutan jaron je sia dispono trovi kaj proponi la plej taŭgajn membrojn por aktualaj taskoj kaj variigi la agojn inter la klubanoj.

La klubo estas membro de Sveda Esperanto-Federacio. Tiamaniere ĉiu membro aŭtomate fariĝas ano de la Landa Asocio kaj AM de UEA. La federacia gazeto *La Espero* estas sendata al ĉiuj, kaj la klubo havas neniujn zorgojn pri kolekto de abonoj. Sed krome ĉiu klubano ricevas senkoste la monatan kluban multobligitan informilon *La Folio*. La unua numero aperis antaŭ pli ol 25 jaroj, kaj la distribuado eĉ ne haltis dum la militaj jaroj. *La Folio* enhavas informojn pri la klubo, sed la ĉefa parto fakte estas la programo.


Ek de 1935 la klubo posedas propran ejon. Kelkfoje la esprimo "propra" estas uzata por ejo, kiun la loka societo vizitas nur unufoje semajne, sed *La Studhejmo* en Malmö apartenas al la klubo, kiu tie aranĝas kursojn, kunsidojn por maksimume 80 personoj, konservas bibliotekon, vendas librojn kaj gardas parton de la arĥivo.

VIVO KAJ ORGANIZO DE LA LOKAJ SOCIETOJ

Unu el la sekcioj de la Universala Kongreso de Esperanto en Mainz, 1958, traktis la laboron de la lokaj societoj kaj provis surbaze de raporto, ellaborita de s-ro Jan Strönné, Malmö, Svedujo, trovi solvojn. La temo neniel estas elĉerpita. La esperantistaro kontraŭe povas antaŭvidi pli da aktiveco en la venontaj jaroj, kaj la revuo *Esperanto* intencas, se eble, de tempo al tempo prezenti kelkajn skizojn de la laborprogramo de kelkaj modele agantaj lokaj societoj. Ni turnis nin unue al s-ro Jan Strönné, Malmö, Svedujo, petante, ke li donu etan skizon pri la laboro de la urba societo, kie li antaŭe dum multaj jaroj estis prezidanto.

Programo.

Pro tio ke multaj klubmembroj aliĝas al la kursoj (ankaŭ al la konversacia studrondo, kiu regule laboras), la klubo havas kunvenojn maksimume dufoje monate. Kelkaj studrondoj ne laboras en tiu semajno, kiam la klubo kunvenas por ne tro multe lacigi la membrojn. La klubmastroj (= programsekretarioj) proponas tre frue por la decido de la estraro la *programojn*, ekz. en januaro por la tuta printempa sezono, en majo por la somero, en septembro por la vintro. Sed por ili estas necese plani duonjaron antaŭe, lui taŭgajn ejojn por la festoj, antaŭe anoncigitaj prelegoj ktp., kiam oni antaŭvidas, ke la klubejo ne sufiĉos por la aŭskultontaro. La ĉefaj punktoj estas la festoj (Kristnaska, printempa, kursfina, aŭtuna, Zamen-



El la klubo arkivo: La saluto de D-ro Zamenhof okaze de la fondiĝo de la klubo en 1906.

hofs festoj), por kiuj la klubo tre frue elektas specialajn komitatojn, kaj ili proponas kaj poste plenumas la programojn (kantoj, muziko, teatraĵoj, prelegoj de eksterlandanoj — speciale ĉe jubileo — prelegvojaĝantoj apartenas al ordinaraĵ klubaj kunsidoj). La komitatoj ĉiam elektas la plej taŭgajn ejojn por ĉiu programtasko.

La monata *La Folio* prezentas la bazan programon por tuta sezono kaj poste ripetas ĝin parton post parto, kaj la estraro eĉ dissendas specialajn memorigojn inter la gazetnumeroj.

Ordinaraĵ klubaraĝoj okazas en la klubejo, kiu havas hejman atmosferon pere de la Esperantofotoj, interesa libroekspozicio, Esperanto-glumarkoj kaj Esperanto-poŝtmarka ekspozicio. Floroj troviĝas sur la tabloj, kaj la du klubmastroj persone ĉiam bonvenigas la klubanojn kaj helpas novajn vizitantojn trovi geamikojn ktp. El la programoj tie: Viva gazeto, literatur- kaj muzikvesperoj, klubmembroj rakontas pri travivaĵoj, eksterlandaj gastoj faras same. Programo kombinita kun muziko ĉiam estas interesa. Prefere lumbildoj donas pli da intereso al la prezentadoj. La klubo mem posedas lumbildaparaton, filmprojekcian aparaton, pianon ktp. En ĉiuj klubaj kunvenoj la klubmastroj regalias la partoprenantojn per kafo-kukoj je tre malmultekosta prezo. Kelkfoje eĉ eta supeo apartenas al la programo. Dum la kafrinkado komuna kantado el speciala por la klubo pretigitaj kantlibroj okazas. Krome lingva kvaronhoro ktp.

Kiam neatendita, eksterlanda gastu prelegas ekster la frue skizita programo, la klubo aranĝas specialan kunvenon, plurfoje en alia ejo.

En la somero ekskursetoj al idiliaj lokoj apartenas al la monata programo, la membroj partoprenas diversajn kongresojn, jarkunsidojn ktp.

Informado.

Post ĉiu klubaj kunveno aperas senkosta noteto en la urba gazetaro, kaj la ĵurnalistoj afable akceptas intervjuojn, eĉ kun bildoj, kiam eksterlanda prelegisto nin vizitas. Antaŭ la komenciĝo de la kursoj la klubo aperigas afiŝojn en la urbo, pagas anoncojn en ĉiuj gazetoj kaj regule aranĝas informvesperon. Ĝin ordinare vizitas multaj homoj, kaj ĝia programo konsistas el mallonga informprelego kaj rapida Cseh-kurso, post kiu sekvas paŭzo, dum kiu la klubo regalias ĉiujn per kafo kaj kukoj — senkoste. Dum tiu paŭzo la estraranoj kaj aliaj serĉas kontakton kun vizitantoj kaj respondas al ĉiuj demandoj, persone rakontas pri la klubo kaj faras sian eblon por doni al la gastoj amikan senton.

Fine prelego kun kolorbildoj pri ekskursoj kaj kongresoj. La nomojn de ĉiuj gastoj la klubo ricevas sur slipoj pere de ruza loterio, kaj jam kelkajn tagojn poste ĉiuj ne-esperantistoj akceptas hejme leteron kun ripeta invito al kurso por komencantoj, informoj kaj admono kunpreni geamikojn.



Kiam la studgvidanto, kiu estras la informan

fakon, havas eblecon aranĝi prelegojn en aliaj societoj, tiel okazas. La klubo uzas la broŝurojn, kiujn senkoste donas la Landa Asocio.

Ĉe la Skania Foiro, kiun vizitas jare pli ol 100.000 personoj, la klubo regule aranĝas ekspozicion kaj invitas al kursoj. Ĉar ne nur urbanoj vizitas tiun foiron, la informado havas vastan sed ne tujan efikon.

Instruado.

La studgvidanto (atentu: ne la kursgvidantoj) aranĝas la kursojn, proponas gvidantojn kaj ĉiumaniere provas krei bonan kontakton inter la klubo kaj la lernantoj. Prefere la gvidantoj de la kursoj por komencantoj devas bone atenti informadon pri la klubo, la movado ktp. (multobligitaj informiloj kaj invitiloj por membroj ekzistas). La studgvidanto regule aranĝas en la klubejo specialajn amikajn vesperojn kun programo (sekvata de ĝuinda horo ĉe la kaftablo) por certaj kursoj ve-



La ĉambroj de la Studhejmo prezentas kelkajn angulojn.

kante la intereson movadan. Ĝis nun la klubo sukcesis aranĝi siajn kursojn sen helpo de eksterlandaj geinstruistoj kaj pagas neniun salajron al la gvidantoj. Post dua kaj tria daŭrigaj kursoj la membroj kelkfoje mem organizas studrondojn, kiuj okazas en la hejmoj, efika kaj bonega maniero.

En la studhejmo laboras i.a. konversacia studrondo, kiu *regule* kunvenas havante propran programon. Efektive tiu studrondo (por ĉiuj membroj) estas komparebla kun pluraj Esperanto-kluboj, kiuj *regule* kunsidas en la sama ejo prezentante diversspecajn lingvoekzercajn programojn. Sed klubo nepre devas krome de tempo al tempo havi la grandajn (aŭ mezgrandajn) programvesperojn, informvesperojn kaj amuzdonajn festojn por homoj, kiuj ofte estas lacaj post la taga laboro sed kiuj grandparte paralele estas membroj de kursoj aŭ studrondoj, kelkfoje dum eĉ pli ol 25 sinsekvaj jaroj.

Ĉiujare la klubo prezentas la plej multajn Esperanto-ekzamenojn inter la svedaj kluboj.

Praktika aplikado.

La membroj multnombre veturas al kongresoj, jarkunsidoj kaj kursoj en eksterlando. La klubo partoprenas la aranĝon de la ĉiujara dan-sveda tago. Kontakto kun la turistorganizaĵo urba rezultis je bela broŝuro.

La membroj korespondas kun geamikoj en aliaj landoj, kaj jam en la kurso por komencantoj oni donas helpon, eĉ pere de multobligita informilo kaj adresoj. Teatraĵoj kaj prelegoj donas al la membroj eblecon ion prezenti en Esperanto.

La situo de la urbo donas al la klubo ege multajn okazojn havi kontakton kun eksterlandanoj, kiuj aŭ restas aŭ nur preterpasas.

Ekonomio.

La klubo havas tre grandajn elspezojn por siaj studhejmo, informado, programo ktp. Ordinara membro pagas 15 sved. kr. jare kaj ricevas la presitan svedan gazeton *La Espero* kaj la informilon *La Folio* de la loka societo. Ĉiuj familiaj membroj pagas nur 4 sved. kr. sed ne ricevas la nomitajn publikaĵojn. Gejunuloj pagas malpli.

Sed krome ekzistas pluraj aliaj enspezfontoj. Ek de la fondiĝo de la klubejo (la studhejmo kun biblioteko, eta arĥivo, telefono, provizejo de la librovendisto, gazetbreto kaj kuirejo kun ebleco servi 80-90 personojn) konsiderinde granda nombro da membroj pagas jare 12 kr. kiel donacumon por la lupago.

Ĉiuj kurskotizoj estas neta gajno kaj apartenas al la kluba kaso. Nur kelkfoje la kursoj estas tiel multaj ke oni por tre malalta prezo devas lui ejon en lernejo. Notinde estas, ke la klubo de tempo al tempo ricevas donacojn de la klubanoj.

La librovendisto, kiu prezentas la plej bonan rezulton inter ĉiuj klubaj reprezentantoj de Eldona Societo en nia lando, donacas sian tutan profiton

al la kluba kaso. Por tiu donaco la loka societo aĉetas librojn por sia biblioteko (sed kompreneble ankaŭ akceptas librojn donace). Ankaŭ la servado de kafe pere de la klubmastroj donas profiton por la kluba kaso.

Sed plej interesa estas la tradicia kristnaska fiŝo, kiu jam depost pluraj jaroj okazas 3-4 semajnojn antaŭ kristnasko. La membroj donacas ĉiuspecajn varojn, aĉetitajn aŭ memfaritajn, kaj dum 2-3 ege interesaj kaj humorriĉaj horoj plena salono ĝojas pri la aŭkcio. Pluraj neesperantistoj ĉeestas, konatiĝas kun la movado kaj aĉetas. Dum kelkaj horoj la kluba kaso ricevas nete 800-900 sved. kr.

Pormovada laboro.

La klubo, kiu fondiĝis en la jaro 1906, en la daŭro de pli ol 50 jaroj laŭeble agadis por doni helpon al la Esperanto-movado entute. Plurfoje la klubo aranĝis la jarkongresojn de la sveda movado kaj aktive partoprenis la fondon kaj daŭran laboron de la suda distrikta organizaĵo. En la jaro 1948 LKK de la 33-a UK, Malmö, konsistis el membroj de la klubo.

Eldona Societo Esperanto translokiĝis de Stokholmo al Malmö, kie membroj de la klubo formas la novan estraron de Eldona Societo, kaj dum pluraj jaroj la klubo aktive kunhelpis la aranĝojn de la prelegsemajnoj en Frostavallen.

Dum pli ol 10 jaroj Sveda Esperanto-Federacio (kies prezidanto estas membro de la klubo) organizis B-sekretariejon en Malmö, kaj pluraj klubanoj kiel komisiitoj pri diversaj taskoj aktive servas al SEF.

Dum la unua kaj dua mondmilitoj la klubo aktive laboris kaj estis preta kunhelpi post la finoj Pluraj kontaktoj personaj estas notindaj en la daŭro de la jaroj.

Posedaĵoj.

Por povi efike servi al la membroj klubo devas havi je sia dispono multe da materialo. Se ĝi ne povas mem havigi ĉion, ĝi devas serĉi kontaktojn inter la membroj aŭ konatuloj de la membroj por je konvenaj okazoj pruntepreni aparatojn ktp. Tion faris kaj daŭre faras la klubo en Malmö. Sed samtempe en la daŭro de la jaroj la ekonomia situacio ebligis al ĝi mem havigi multon.

La klubejo (studhejmo) ekzistas. Piano, lumbildaparato, filmprojekcia aparato, elektra multobligata aparato, pluraj skribmaŝinoj, multekosta standardo kaj granda arĥivo troviĝas.

Nia biblioteko estas konsiderinde granda. Sed ni pruntedonas librojn nur al tiuj kiuj vere bezonas prunti librojn por speciala celo. Alie oni rapide difektas ege valorajn, neaĉetebajn librojn kaj — pri novaj libroj — tute ne aĉetas tiajn de la librovendisto.

Pluraj aliaj detaloj estas menciindaj. Mi tamen esperas, ke mi sukcesis doni etan imagon pri la vivo de la loka societo en Malmö. *Jan Strönnne*



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:
Philippe Bonnard,
119 Avenue de Choisy, Paris 13, Francujo

15-a Internacia Junulara Kunveno de TEJO

Unua oficiala komuniko

La 15-a Internacia Junulara Kunveno de TEJO okazos de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1959 en Gdansk, Pollando.

La 15-a IJK okazos sub honora protektado de Prezidanto de Vojevodiana Konsilantaro Jozef Volek, kaj sub aŭspicioj de la Loka Kongresa Komitato de la 44-a Universala Kongreso en Varsovio.

Provizora programo:

Interamikiga vespero, diservo en Esperanto, solena inaŭguro, vizitado de tri urboj: Gdansk, Gdynia, Sopot; laborkursidoj de TEJO, kulturaj prelegoj, oratoria konkurso, folkloraj kaj gajaj vesperoj, solena fermo kaj forveturo per karavano al la 44-a UK en Varsovio.

Kotizoj:

La kotizo, kiu enhavas la loĝadon en studenta domo aŭ en lernejo, ĉiujn manĝojn kaj ĉiujn aranĝojn, estas por membroj de TEJO malpli ol 20-jaraj:

ĝis 15.4.59 : 12 usonaj dolaroj
ĝis 30.6.59 : 14 usonaj dolaroj
pli ol 20-jaraj :
ĝis 15.4.59 : 13 usonaj dolaroj
ĝis 30.6.59 : 15 usonaj dolaroj

4-A TEJO-Skiferio en Filzmoos, Aŭstrio

Alvenis 30 geamikoj el ses landoj, nome el Germanujo, Italujo, Anglujo, Norvegujo, Usono kaj Aŭstrio.

La vetero estis favora. Ni havis sufiĉe da neĝo kaj multan sunon.

Kiu pro iu ajn kaŭzo ne volis skii, promenis aŭ sidis revante en la suno. Dum la longaj vesperoj ni multe amuziĝis kantante, ludante, dancante. Dum unu vespero ni eĉ havis je nia dispono kompletan dancorkestron. Diversaj gitaristoj, geaktoroj (ne profesiaj) kaj eĉ sorĉistoj ne mankis inter ni.

La antaŭaranĝaj promesoj estis neniel troigitaj. Ravis nin ĉiujn la sorĉo de la nin ĉirkaŭantaj neĝmontoj kaj la ĉarmo de la kamparana vilaĝo kun ĝiaj ĝentilaj homoj. La 2-a Internacia Skikonkurso ankaŭ bone sukcesis. La unuan premion gajnis la favorato Frank Giessner.

Heinrich Reiter

Nemembroj de TEJO devas pagi unu dolaron pli.

Aliĝoj estas riceveblaj ĉe la 15-a Internacia Junulara Kunveno de TEJO, Garncarska 18, Gdansk, Pollando, aŭ ĉe jenaj reprezentantoj:

Britujo: S-ro H. R. Tonkin, 7 Granby's Lane, Perranporth, Cornwall.
Bulgarujo: Junulara Fakocieto de B.E.A., Sofio, poŝtkesto 44.

Ceĥoslovakio: S-ro Drahomir Kočvara, kamenec 251/3, Ostrava.

Danlando: S-ro Hans Frey, Ørnevej 27, Frederikshavn.

Germanujo (Okc.): Germana Esperanto-Junularo, T 6/18, Mannheim.

Germanujo (Ori.): S-ro Hieronymus Stroinski, Borsdorf ĉe Leipzig, Koloniestrasse 10.

Hungarujo: D-ro Imre Ferenczy, Paradvurdo, Korhaz.

Francujo: S-ro Paul Ciliga, 17, rue Duguay Trouin, Paris VI.

Italujo: S-ro Nicola Minnaja, Viala Giulio Cesare 223, Roma.

Jugoslavio: S-ro Ivo Osibov, Tuškanova 21/III, Zagreb.

Sovjetunio: Moskva Junulara Esperanto-Grupo "Fajrero", Moskvo K-9, Poŝtkesto 1253.

Nederlando: S-ro Adriaan den Haan, Atjehstraat 2, Leiden.

La Skirestado de Esperanto-Junularo de Svislando.

La 26-an de decembro 1958, 18 junuloj el Svislando kaj unu gasto el Anglujo renkontiĝis en Adelboden por kune pasigi la 3-an skirestadon de EJS.

La tagoj estis dediĉataj al la vintraj sportoj: skiado kaj glitŝuado. Dum la komencantoj ekzercis sian arton sur la apudaj facilaj skiejoj, la "ĉampionoj" grimpis sur la pli altajn montojn por ĝui ties idealajn deklivojn. Kelkfoje, kiam la vetero estis bela, ni foriris jam matene, kunprenis nian piknikon kaj tagmanĝis supre sur iu montopinto, lasis nin brunigi de la suno kaj ĝuis dolĉan nenionfaradon.

Vespere, post la manĝo, okazis Esperanto-kursoj por komencantoj kaj por la progresintoj. Du festoj plezurigis ĉiujn kaj alportis multe da ĝojo en nian restadon; la silvestra nokto kaj epifanio.

Max Abegg

Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo

La tradicia seminario de Germana Esperanto-Junularo okazis de la 27-a de decembro 1958 ĝis la 2-a de januaro 1959 en la junulargastejo Bischofs-sondern en Bottrop/Vestfalia partoprenata de 30 junaj geesperantistoj el Danlando, Germanujo, Nederlando kaj Svedujo. Ĉifoje la temo estis la Unuigintaj Nacioj.

Honora protektanto estis la ĉefurbestro de Bottrop, s-ro Ernst Wilczok, kiu akceptis la gepartoprenantojn en la urbodomo.

Grandan ĝojon kaŭzis la sonbendo de la UN-Esperanto-Klubo en New York kun tre interesaj raporto pri la laboro de la klubo kaj pri la historio, la teknika asistado, la lingva situacio kaj la signifo de la Unuigintaj Nacioj.

Krome prelegis Richard Reuchlin, Mannheim, pri la organiza strukturo de UN, Günther Becker, Blieskastel/Saar, pri la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj pri la signifo de UNESKO por la kultura vivo de la mondo, kaj Joseph Janoska, Heidelberg, pri la interpretado dum internaciaj konferencoj kaj pri la Internacia Organizaĵo de Laboro. Börje Andersson el Skövde, Svedujo, parolis pri Alfred Nobel kaj la Nobel-Fondaĵo, kaj Margot Wietrzynski el Berlino raportis pri la Internacia Ludoĉambro en Kopenhago.

La varba efiko de la seminario estis rimarkinda: Radio kaj televido venis al la junulargastejo kaj faris intervjuaĵojn poste dissenditajn dum ok resp. kvin minutoj. Estis la unua fojo, ke en Germanujo la televido vizitas esperantistan junularkunvenon. Ankaŭ la gazetaro publikigis ampleksajn kaj favorajn raportojn kun belaj fotoj.

En vigla kaj sendube fruktedona diskutado pri la internacia interkompreniĝo de la junularo en la sindikata domo ĉeestis reprezentantoj de gravaj junularaj organizaĵoj de Bottrop, urbo kun 105.000 enloĝantoj.

Diskutado pri la moderna esperantista agado, sonbenda resumo pri la majenca kongreso, surbendigo de konversacia raporto pri la seminario por la UN-Esperanto-Klubo en New York, silvestra balo kun piroteknikaĵo, novjara ekskurso kaj prezentado de filmoj kaj lumbildoj pri internaciaj junularkunvenoj de la jaro 1958 kompletigis la programon de la seminario, al kies bonega sukceso grave kontribuis la organiza helpo de s-ro Willi Seidel, direktoro de la profesia fajrobrigado en Bottrop. Al li kaj al ĉiuj aliaj subtenintoj, nelaste al la Germana Federacia Ministro por Familiaj kaj Junularaj Aferoj pro konsiderinda subvencio, kore dankas la streĉe laborintaj kaj gaje festintaj junaj geamikoj.

R. R.



44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varsovio — Pollando

1.-8. aŭgusto 1959

JUBILEA ZAMENHOFA JARO

Sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de Pola Popola Respubliko

JOZEF CYRANKIEWICZ

Adreso :

44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio.

Telegramoj :

Esperanto-Kongreso, Warszawa.

MONATA KOMUNIKO

N-ro 5

Februaro 1959

Fakkunvenoj

Anoncas fakkunvenon :
Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista pri "La katolika literaturo en Esperanto", "Sugestoj kaj perspektivoj pri la katolika literaturo".

Internacia Rondo de Arkitektoj, Ark. Kazimierz Tympiński, Varsovio (Pollando), str. Górnosińska 45.V.24.

Akademio de Esperanto

La Akademio de Esperanto, Wassenaarseweg 11c, Den Haag, Nederlando, informas pri jena temo : "Diskuto pri geografiaj nomoj".

Diservoj

Kristana Esperantista Ligo Internacia okazigos protestantan diservon dimanĉe la 2-an de aŭgusto en la preĝejo de la Sankta Triunuo en Varsovio.

Libro pri Varsovio

Ĉiu kongresano ricevos donace en la Kongresejo 240-paĝan riĉe ilustritan libron pri Varsovio.

Kongresa Libro

La kongresa programo estos sendata al ĉiu kongresano unu monaton antaŭ la komenciĝo de la Universala Kongreso. La Kongresa Libro ne estos antaŭe sendata, sed disdonata.

Revuo "Pollando"

Ĉiu kongresano ricevos senpage unu numeron de la reaperta grandformata revuo en Esperanto "Pollando".

Statistiko (ĝis fino de januaro) :

Arabujo 1, Argentino 2, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 26, Belgujo 21, Brazilo 3, Britujo 67, Bulgarujo 6, Ĉeĥoslovakio 2, Cejlono 1, Danlando 40, Etiopio 1, Finnlando 19, Francujo 77, Germanujo 71, Hispanujo 9, Islando 2, Italujo 72, Japanujo 3, Jugoslavio 27, Kanado 1, Maroko 1, Meksiko 1, Monako 5, Nederlando 49, Norvegujo 6, Novzelando 2, Pollando 663, Portugalujo 2, Sovetunio 3, Svedujo 80, Svisujo 18, Sudafriko 2, Turkujo 1, Urugvajo 1, Usono 8.

Entute 1296 el 36 landoj. (Pasintjare 976 el 29 landoj).

Gian Carlo Fighiera, Konstanta Kongresa Sekretario.

ESPERANTO EN TELEVIDO

Kiel en multaj aliaj landoj, ankaŭ en Nederlando la televidaj programoj enkondukis tiun ludon, kiun oni preskaŭ internacie indikas per la nomo "Quiz". Por ne provoki la fulmkoleron de la neologismoĉasantoj, mi ne proponas la vorton "Kvizo", sed parolos pri "Demandkonkurso".

En tiu konkurso la partoprenantoj estas demandataj pri tiu temo, kiu plene okupas ilin, kiam ne okupas ilin la penlaboro. Iu roterdama esperantisto dum unu jaro rigardis tiun programon, atendante ke iu ekparolos pri Esperanto. Kiam tio ne okazis, li decidis fari tion mem. Li anoncis sin ĉe la kompetenta instanco por la temo "Esperanto", ne dirante, kompreneble, ke li antaŭvidas propagandon.

Dum pluraj monatoj li ĉiel profundigis kaj larĝigis sian scion pri la movado, la historio, la literaturo ktp. Por

siaj ekzamenoj li eĉ ne tiom studis, kiom por tiu ĉi konkurso. Ja ĉian demandon oni povas atendi! Se oni bone respondas, oni povas trifoje aperi en la televida programo. Tion tiu esperantisto, S-ro B. van der Wal, sukcesis atingi kaj tio praktike signifis, ke trifoje oni donis dum proksimume kvaronhoro informojn pri Esperanto en televida programo rigardata de centmiloj da personoj. Antaŭ ol komenci la demandojn, la gvidanto de la konkurso kutimas konversacii kun la demandoto pri la temo. Estis do eble, doni multajn informojn, montri objektojn kiel la ŝlosilon, fotojn k.s. La rezulto de tiuj tri elsendoj, sinsekve en novembro, decembro kaj januaro, estis grandioza. Neniom antaŭe oni tiel ĝenerale ĉie en la lando parolis pri Esperanto. Forta interesiĝo estis vekita. Ĉiuj ĵurnalo recenzis la elsend-

ojn kaj krome aperis dekoj da apartaj artikoloj kaj intervjuoj.

Unu tagon antaŭ la lasta elsendo, iu lerta esperantisto en Hago havis alian brillan ideon. Li kontaktis gazeton kaj demandis, ĉu ĝi pretas publikigi Esperanto-kurson. Fulmrapide la afero estis aranĝita kaj S-ro van der Wal povis informi pri tiu iniciato en la lasta elsendo. La rezulto estas : 1300 partoprenantoj en tiu gazeta kurso!

Ni iom detale rakontas ĉion ĉi, ĉar ĝi estas bonega ekzemplo por aliaj landoj. Ni vivas en la Zamenhof-Jaro kaj ni vivas en la epoko de florado de tiaj demandkonkursoj. Sendube simila afero estos ebla en pluraj landoj. Ĝi kostas neniam kaj la efiko estas ne-takseble valora. Sed necesa estas unu sindona kaj lerta esperantisto, kiu pretas tiel plene dediĉi sin al la afero, ke li havas realan ŝancon atingi la

TRADUKADO NACILINGVEN (daŭrigo de p. 49)

ili tralegu la artikolon kaj donu al vi sian sinceran kaj severan kritikon. Estas grave, ke la koncernaj personoj mem havu rutinon pri verkado, kaj estas plej utile, ke almenaŭ unu el la kritikantoj estu kritikema neesperantisto (ne nepre bonvolema), kiu povas kritiki tiujn detalojn, pri kiuj ni eble pro amo al nia afero blindiĝis, sed kiuj en la okuloj

de neesperantistoj aspektas tro ekzaltaj, tro sentimentaj, aŭ kiuj donas al la teksto ian alian atmosferon, kiun ni ne deziras doni al ĝi.

